
Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Aŭstraliaj  Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 12/08/2021 Kvincentkvardektria eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 810,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 280,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 227,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 200,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 103,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde decembro 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 47 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En la kanto "La Espero" troviĝas en la unua strofo la longa frazo "Ne al glavo sangon soifanta ĝi la homan tiras familion". Se la teksto dirus "Ne al glav' eterne soifanta", kiu frazparto estus la vorto "eterne" kaj ĉe kiu verbo ĝi apartenus?

2). La al la verso en n.ro 1). sekvanta verso tekstas "al la mond' eterne militanta ĝi promesas sanktan harmonion". En ĉi lasta verso, kio estas la ĉeffrazo, kaj al kiu verbo apartenas la vorto "eterne"?

3). En la lasta frazo en n.ro 2, kiu frazparto estas la vorto "ĝi", kaj al kiu verbo ĝi apartenas?

4). En la saluto "Bonan vesperon" kial ĝi havas la akuzativon, kaj kial ne estas akuzativo en la invito "Venu kun mi al la restoracio"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 543. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.





Esperanta Retradio

**Redukti kaŝitan konsumon de akvo**

7a Augusto 2021

## " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas kiel legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

***Google Translate*** estas bonega tradukilo por vortoj anstataŭ uzi vortaron. Metu la ligon sur vian ekranon.



**Hazel Green** estas ege malsana.


Ŝi suferis/as kanceron kaj nun ŝi estas en paliativa prizorgo (*palliative care*).

Bonvolu konsideri skribi aŭ telefoni ŝin. Hazel Green ĉe Palliative Care, Regis Chelmer, 35 Victoria Ave, Chelmer QLD 4068. 0423-151318

Plej amike, *Sandor Holvarth*



**La Ĉiama Milito** Post kiam Usono forlasis Afganujon, ĝi daŭre bombas la landon kiam ĝi ne ŝatas kiel aferoj iras. *Roger S*







***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*

# La iam kroma "Meza Ekzameno" de A.E.A. ,

**EN KIU LA EKZAMENISTO**

ne kalkulas la erarojn sed nur la bonaĵojn.

Notu ke mi Esperantigis la anglolingvajn instrukciojn de ĉi tiu provekzameno.

**Q**. 1. Respondu anglolingve al la jenaj demandoj pri la gramatiko de Esperanto:

**A**. Donu la ialon por la akuzativo en ĉiu el la jenaj frazoj:

a. La muso malaperis sub la ŝrankon.
b. Baldaŭan dimanĉon ni vojaĝos al Novzelando.
c. Ĉu vi vojaĝos Velingtonon?
d. Ne forgesu vian ombrelon!

**B**. Se prepozicio estas ŝanĝata al verbo, kio fariĝas ĝia Subjekto kaj kio fariĝas ĝia Rekta Objekto? Uzu la jenajn frazojn kiel ekzemplojn:

a. La parolado antaŭ la koncerto.
b. Bovinlakto anstataŭ patrinlakto por la infaneto.
c. Kelkaj homoj sur la luno.

**C.** Kial ni diras fosilo kaj kombilo, sed ne *martelilo nek *brosilo?

**D.** Kio estas la diferenco en signifo inter "Ili marŝis kvarope" kaj "Ili marŝis po kvar"?

**E.** Kio estas la diferenco inter "La hundo manĝis jam trifoje post sia malsano" kaj "La hundo manĝis jam trioble post sia malsano"?

**F.** Kial "Hieraŭ *malpluvis" kaj "Mi *malpensis pri tio" estas malĝustaj? Kio ili devas esti?

**G.** Kiuj el la sekvantaj sufiksoj povas uzati nur kune kun transitivaj verboj: -ilo, -inda, -ema, -ero, -enda, -ulo, -igi, -ebla, -ata, -inta.

**H.** Kio estas la diferenco inter la signifoj de "vagonaro" kaj "aro de vagonoj" kaj de "domego" kaj "granda domo"?

Kiuj el la sekvantaj frazoj estas ĝustaj tradukoj de *We wanted her to drink*:

a. "Ni deziris ŝin trinki";
b. "Ni deziris ŝin trinkanta";
c. "Ni deziris ke ŝi trinku";
d. Ni deziris ŝin trinkante".

**J.** Por ĉiu el la sekvantaj radikoj de vortoj (aŭ sufiksoj) diru, ĉu ili estas baze substantivo, verbo, aŭ adjektivo: blank-; ul-; saĝ-; ec-; kant-; rev-; ebl-; aĵ-; iĝ-; vir-; ŝanĝ-; kret-.

**K.** Kio estas la diferenco de la signifoj de "kuiris", "estis kuiranta" kaj "estas kuirinta" en ekzemple (ne simple traduku!):

a. Mi kuiris la ovon jam antaŭ dek minutoj.
b. Antaŭ dek minutoj mi ankoraŭ estis kuiranta la ovon.
c. Mi nun jam estas kuirinta la ovon. ?

**L.** Kiu(j)n speco(j)n de vortoj ĝenerale difinas la adverbo "ĉi"?

**M.** Ĉu ekzistas diferenco inter "Li kolorigis la tabulon" kaj "Li pentris sur la tabulon"?

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Se vi pensas ke ekzistas, kiu diferenco?

**N**. Kial ni devas diri "bogefratoj" kaj ne "*gebofratoj"?

*Marcel Leereveld*. (48 poentoj, el 750).

# PROFANA KAJ PRUDENTA

La erudicia kaj ĉiam elokventa eks-Prezidento de Usono, Donald Trump, nomis Haition kaj Afrikajn naciojn "shitholes " (feko-truoj) de kiuj li ne volis permesi eniron de enmigrantoj. Diversaj tradukistoj donis sian propran interpreton de tiuj vortoj kaj precipe plaĉis al mi tiu de la ĝentilaj Japanoj: *landoj kie birdoj ne demetas ovojn.* *Vera Payne*😊







*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## SOLVO DE LA KVIZETO 47

1). La vorto "eterne" estas adjekto ĉe la verbo "soifi".

2). La tuta frazo "al la mond' eterne militanta ĝi promesas sanktan harmonion" estas nekompleksa frazo ĉar ĝi havas nek ĉeffrazon nek subordan frazon.
La vorto "eterne" apartenas al la verbo "militi".

3). La vorto "ĝi" estas la subjekto ĉe la verbo "promesi".

4). Ĉar "bonan vesperon" estas mallongigo de "Mi deziras al vi bonan vesperon", en kiu frazo "bonan vesperon" estas la gramatika objekto ĉe la verbo "deziras".
En "Venu kun mi al la restoracio" ĉeestas du prepozitivoj kiuj ne bezonas duan prepozicion transformeblan al akuzativo, ekz. "al en la restoracio > en la restoracion".

. *Marcel Leereveld.*

# Invito al la jarkunveno/ invitation to the AGM of the NSW Esperanto Federation

La Jarkunveno de EFNSK okazos **dimanĉon la 12an de septembro je la 11-a matene**. Ĝi okazos **virtuale** per la programo Zoom.

https://zoom.us/j/9177952650?pwd=Wkh5QU9rakhnUnF2WEVSWDI2ZnF6dz09

Kunveno ID: 917 795 2650
Kodo: 700274

La estraro demisios kaj la postenoj estos atribuitaj dum la jarkunveno.

Ĉiuj kandidatoj, inkluzive de tiuj, kiuj jam estas estraranoj, devas esti kandidatigataj kaj subtenataj. La kandidatoj devas ankaŭ konsenti, per retpoŝto, ke li aŭ ŝi akceptos la postenon.

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

La sendanton de la unua kandidatigo oni konsideros kiel la proponanton, la duan kiel la subtenanton. Ambaŭ devas esti financaj membroj de EFNSK.

Laŭ la nova statuto de la Federacio (legebla ĉe http://esperantohouse.org.au/eo/about-us/), se iu estis estrarano seninterrompe dum naŭ jaroj aŭ pli, speciala rezolucio devas okazi, por permesi lin aŭ ŝin esti kandidatigata (kaj elektota) dum pluaj periodoj. Tial, ni voĉdonos pri la jena rezolucio (en la angla) dum la jarkunveno:

• That Nicole Else, Alan Turvey and Dmitry Lushnikov be permitted to be re-elected as directors.

Membro povas esti kandidatigata por unu aŭ pli el la jenaj postenoj:
- prezidanto
- vicprezidanto
- ĝenerala estrarano

Sendu kandidatigojn rete al: **nsw@esperanto.org.au**
Aŭ poŝte al:
EFNSK
Esperanto House
143 Lawson St
Redfern NSW 2016

Ni esperas, ke vi povos ĉeesti la jarkunvenon, kaj bonvolu sciigi nin, ĉu vi deziras esti kandidatigata por la estraro aŭ povas iel helpi la Federacion.
Se vi NE povos ĉeesti sed tamen ŝatus voĉdoni, vi povas peti iun voĉdoni nome de vi (kiel via mandatulo). Bonvolu kontakti nin se vi ŝatus pli da informoj.

Ni ankaŭ feliĉus aŭdi viajn komentojn, ideojn, ktp, por la venonta jaro.

Amike,
*Nicole Else* Sekretario, EFNSK

**3ZZZ** La temoj de la elsendo de la 9a de aŭgusto 2021 estas kiel science trakti mensajn malsanojn, nekutimaj manĝaĵoj kaj ĉu legi librojn gravas por esperantistoj.



*Franciska Toubale*




**25 milionoj 19 miloj kaj 560 homoj subskribis.** Nun fermata.
Ĉu 25 milionoj da homoj ne gravas ĉar la plej multaj subskribintoj estas ĉinaj ? *Roger Springer*

**_Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE_**